

OFICIALA ORGANO DE PROLET-ESPERANTISTA UNIO DE IBER-AMERIKAJ LANDOJ

1-a JARO 1932	REDAKTEJO kaj ADMINISTREJO Galileo, 40 - Barcelono (Sans)	APERAS MONATE Novembro - Decembro	SOCIA SIDEJO Galileo, 40 - Barcelono (Sans)	N-oj 3-4

La necesidad de Federaciones Lingüísticas para el desarrollo de P. U. I. L.

La creación en el modelado del estatuto de P.U.I L. de las federaciones lingüisticas responde a una necesidad existente en el territorio hispano-americano.

Tanto en América como en la península son varias las lenguas nacionales literarias que se hablan y muchos los dialectos. Si tienen o no razón de existir esas diferentes formas de expresar los conceptos en un mismo terreno políticamente unido, no lo discutiremos, el hecho está en que existen.

Lo que si trataremos es de estudiar su formación y forma de evolución.

Después de la caída del imperialismo romano empieza la decadencia del latín, que da origen a todos los dialectos neo-latinos, algunos de los cuales progresan hasta convertirse en lenguas nacionales literarias.

Las lenguas nacionales literarias que presentan un grado primitivo de evolución se han formado de dialectos populares, no sólo por un camino natural (insconsciente), sinó en gran parte por un trabajo consciente artificial (*).

Los dialectos dentro el medio social que los nutre pueden subsistir a veces largo tiempo paralelamente con la lengua nacional literaria y en ciertas condiciones pueden incluso progresar. La lengua nacional es casi siempre una lengua literaria creada y empleada al principio sólo por la plataforma feudal o burguesa del país, (ejemplo el antiguo castellano de Alfonso X El Sabio), en cambio los dialectos los nutre el pueblo, en especial la clase campesina, y van transformándose bajo la influencia de la economía capitalista.

Pero donde podemos mejor observar el proceso de formación de las lenguas nacionales literarias y evolución de los dialectos, es en la península Ibérica.

Así vemos de una manera instructiva, que varios de esos núcleos de población con dialecto propio y sometidos a un régimen feudal despiertan de la opresión y se aprestan a alcalzar el nivel de las naciones cultas europeas acabando la construcción de sus lenguas nacionales literarias.

Oponerse a las corrientes generales de evolución de un pueblo es siempre contraproducente, tanto si se trata de una evolución lingüistica como de una evolución social. Por eso nuestra Unión tiene que tener muy en cuenta las necesidades existentes en el campo lingüistico de todo el territorio donde tiene su desarrollo.

Propugnar por una lengua auxiliar internacional y olvidar automáticamente el dialecto popular y la lengua nacional, no es posible.

Para seguir ese paralelismo, ineludible por ahora, se impone la necesidad de crear federaciones lingüisticas en nuestra organización con el objeto de que estas puedan de una manera más eficaz propagar el Esperanto en los medios de población a que pertenezcan.

Por eso nosotros, proletarios, en oposición a la ciencia lingüistica burguesa nacional e internacional, somos los únicos que de una manera práctica y segura podemos resolver ese problema enfocándolo en su verdadero sentido de evolución (consciente) en sus diferentes épocas ascendentes de: los dialectos populares, lenguas nacionales literarias, lengua auxiliar internacional y lengua universal.

Nuestro siglo termina el período de elaboración de las lenguas nacionales literarias y empieza la aplicación de una lengua auxiliar internacional.

El momento histórico, pues, nos dice bien claro la posición que se ha visto obligada a tomar nuestra Unión al confeccionar sus estatutos. Los compañeros que lo han llevado a cabo han tenido una visión clarísima en todos los aspectos. No podían olvidar por tanto uno de tan importante y primordial para P.U.I.L. como es el de la cuestión lingüistica.

SALVADOR

(*) Ejemplo: el filólogo P. Fàbra en el catalán

De mallumo al lumo nur per Esperanto

Mi estis okjaraĝa kiam miaj gepatroj eksendis min al lernejo por lerni la nacilingvon.

Post kvin monatoj mi estis devigata lasi la lernejon, tial ke ni translokiĝis al alia vilaĝo pro malbonaj cirkonstancoj trovitaj de miaj gepatroj. Neniam plu ili sendis min lerni la nacilingvon. Do! Mi restis ĝis mia plenaĝo preskaŭ senalfabetulo.

Poste, kiam mi atingis la plenjaraĝon mi aĉetis portugalan lernolibron por plibonigi mian bezonatan instruon kaj iom post iom mi akiris pli da konoj, sed ĉiam restis malklerulo. Pri gramatiko mi nenion sciis, ĉar mi neniam posedis ĝin. Antaŭ du jaroj mi ekaŭdis pri Esperanto al mia frato, ĉar li jam estas esperantisto ekde jaro 1928. Li tiom entuziasmigis min, ke mi plendis pro mia malklereco. Li sciigis, min ke Esperanto estas tiel facila, ke eĉ senalfabetuloj povas lerni ĝin.

— Ĉu?..., diris mi — Do! Mi petas al vi, lernigu min se vi kapablas! — Trevolonte, karega frato... Kaj mi tuj komencis lerni per lernolibro «Petro». Lecionon post leciono, mi ekkonis novajn vortojn. Multe laboregis mia frato por enkapigi al mi la gramatikajn regulojn, ĉar kiel mi antaŭe diras mi neniam lernis Portugalan gramatikon. Poste mia frato konsilis min ke mi partoprenu en ia kurso. Mi konsentis kaj kiam oni malfermis kurson mi tuj aliĝis al ĝi. Estis tie, kie mi ekkonis per lernado de Esperanto la ĉefajn gramatikajn regulojn, ĉar mi ne sciis kio estis la pluralo nek la singularo Ĉion, kion mi diras povas atesti ĉiuj Lisbonaj Esperantistoj. Iom post iom mi daŭrigis la enkapigon de novaj vortoj ĝis kiam mi finis la kurson.

Jen la unua parto de mia esperanta lernado.

La dua parto konsistis el la interkorespondado kun eksterlandaj gekamaradoj. Feliĉe okazis, ke inter miaj gekorespondantoj estis hispano, hispanano, kiu plej bone plenumis siajn devojn. Tiu kamarado estas Esteban Casacuberta, li loĝas en Str. Leonor de Moncada 72, Sabadell. La temoj ŝanĝitaj inter ni am-

baŭ estis kaj ankoraŭ estas tre interesegaj. Do, honoron al li! Estis li mem kiu sendis al mi la gazeton «Proleta Voĉo», kies enhavo tre plaĉis al mi. Pli kaj pli mi sentas min feliĉa lerninte Esperanton.

Jen, kiel mi transiris «de Mallumo al Lumo nur per Esperanto.»

Mi ja konas eksterlandajn gekamaradojn, kun kiuj mi interrilatas amikece, kaj sincere.

Mi ankaŭ ja povas interŝanĝi miajn pensojn kaj vidpunktojn, kies taskon mi neniam povus plenumi se mi ne estis lernanta Esperanton.

Do! karaj kamaradoj:

Estas mi kiu atestas, ke la Lingvo Esperanto estas lernebla al ĉiuj laboristoj.

Vivu ĉiuj, esperantistoj proletaj de la tuta mondo.

Francisco de Oliveira Gordo

EL PROLETARIADO Y LA RELIGIÓN

(Continuación)

En tanto no sean los trabajadores quienes dirijan los medios de producción y cambio, los que repartan metodicamente el trabajo entre las diferentes ramas de la producciòn, adaptando racionalmente el conjunto a la producción, la distribuición del trabajo a la distribución de las necesidades, el acrecentamiento del aparato social de producción al acrecentamiento de la población, las necesidades sociales no podrán manifestarse más que por medio de las crisis del mercado mundial, que caen como fuerzas ciegas naturales sobre los indivíduos, cuya impotencia y temor, con respecto a estas fuerzas naturales, reproducen constantemente la necesidad religiosa. La miseria de las masas populares sometidas al capitalismo es lo que crea la necesidad de la oración.

Mientras que la clase obrera no se lanzó a emprender la lucha contra el mundo capitalista, encontró su consuelo en la religión. Sometida en este mundo a amos duros, buscó su consuelo en la plegaria al Señor misericordioso que está en el cielo. Condenada en este mundo a la miseria, halló su consuelo en la esperanza de un mundo ulterior mejor. Las ideas religiosas le ayudaron a soportar el destino que sufría en el mundo capitalista. Refiriéndose a esta fase de la evoluciòn, en que se establecía el socialismo en la otra vida, escribió Marx en su «Crititca de la filosofía del Derecho en Hegel» la célebre frase: «La religión es el opio del pueblo».

. . . .

Sin embargo asistimos a una nueva evolución, que ha apartado de la religión a grandes núcleos del proletariado.

El capitalismo ha arrancado grandes masas populares de su aldea natal y las ha acumulado en las grandes ciudades y en los grandes centros industriales, en plan de rápido crecimiento. Las lanza de ciudad en ciudad, de provincia en provincia. en la sucesión de sus coyunturas. Las somete a la influencia de la vida de las grandes ciudades, a la influencia de su técnica en vías de evolución constante, de sus modas siempre nuevas y de sus sensaciones cotidianas. Transforma constantemente sus condiciones de existencia y las sustrae así a la influencia de lo «que siempre ha sido y vuelve a ser y vale hoy porque ha valido ayer». De esta forma las hace capaces de deshojarse de su religión tradicional, como de todas las demás tradiciones.

El capitalismo coloca al obrero del maquinísmo de la gran empresa. En su propio trabajo, junto a la máquina cada vez más perfeccionada, es donde el obrero se da cuenta de la victoria de la ciencia moderna sobre la Naturaleza. Así se hace accesible al pensamiento científico. Gracias al mejoramiento de la enseñanza popular, a la reducción de la jornada de trabajo, se adueña cada vez más de las conquistas de la ciencia moderna.

El capitalismo obliga al obrero a la lucha de clases; pero en esta lucha el obrero tropieza con el clero, que se ha hecho el defensor de su adversario. Por eso el obrero odia al cura, y a la propia religión, en nombre de la cual el cura defiende el régimen social de la burguesía.

De este modo se desprenden de la religión gruesas capas del prolectariado. Se asimilan las enseñanzas antirreligiosas de la filosofia

(Termina en la página 5)

PEDAZOS DE MATERIALISMO DIALÉCTICO

Plaĉas al ni publikigi verkaĵojn kiel tiun ĉi de nia klera kaj konsekvenca k-do Borrell Soldevila. Ni opinias, ke tiaj laboraĵoj multe devas interesi al la laborista klaso, kiu bezonas akiri sciencan mondkoncepton en opozicio al la ĝisnunaj filosofioj idealistaj burĝecaj. — *La Redakcio.*

He aquí *el hilo conductor* de los estudios de *Marx* expuesto por él mismo.

«En la producción social de su vida, los hombres contraen ciertas relaciones independientes de su voluntad, necesarias, determinadas. Estas relaciones de producción corresponden a cierto grado de desarrollo de sus fuerzas productivas materiales. La totalidad de esas relaciones forma la *estructura* económica de la sociedad, la base real sobre la que se levanta una *superestructura* jurídica y política, y a la cual responden formas sociales y determinadas de conciencia. El modo de producción de la vida material determina, de una manera general, el proceso social, político e intelectual de la vida. No es la conciencia del hombre lo que determina su existencia, sino su existencia social lo que determina su conciencia. En cierto grado de su desarrollo, las fuerzas productivas de la sociedad están en contradicción con las relaciones de producción que entonces existen, o, en términos jurídicos, con las relaciones de propiedad en el seno de las cuales esas fuerzas productivas se habían movido hasta entonces. Esas relaciones que en otro tiempo constituían las formas del desarrollo de las fuerzas productivas, se convierten en obstáculos para éstas. Entonces nace una época de revolución social. El cambio de la base económica mina más o menos rápidamente toda la superestructura. Cuando se estudian esos transtornos, es preciso distinguir siempre entre la conmoción general que agita las condiciones económicas de la producción y que puede comprobarse con una exactitud científica, y la revolución que derriba las formas jurídicas, políticas, religiosas, artísticas o filosóficas, en una palabra, las formas ideológicas que sirven a los hombres para tener conciencia del conflicto y explicárselo. Si es imposible juzgar a un individuo por la idea que de sí mismo tinne, no puede juzgarse semejante época de revolución por la conciencia que ella tenga de sí misma. Es preciso explicar este conflicto por las contradicciones de la vida material, por el combate entre las fuerzas productivas de la sociedad y las relaciones de la producción.

Un estado social jamás muere antes de que en él se hayan desarrollado todas las fuerzas productivas que podía encerrar. Nuevas relaciones de producción, superiores a las antiguas, no ocupan su lugar antes de que sus razones de ser materiales se hayan desarrollado en el seno de la vieja sociedad. La humanidad jamás se plantea enigmas que no puede resolver; pues, considerando mejor las cosas, se notará que el enigma no es propuesto más que cuando las condiciones materiales de su solución existen ya o, al menos, se encuentran en curso de formación. En tesis general, se pueden considerar los modos de producción asiática, antigua, feudal y burguesa, como las épocas progresivas de la formación económica de la sociedad. Las relaciones de producción burguesas constituyen la última forma antagónica del proceso de producción de la sociedad. Este antagonismo no significa un antagonismo individual. Es un antagonismo que dinama de las condiciones de la vida social de los individuos. Pero las fuerzas productivas que se desarrollan en el seno de la sociedad burguesa, crean al propio tiempo, las condiciones materiales indispensables para resolver este antagonismo. Con este estado social se cierra la prehistoria de la sociedad humana».

(De «Crítica de la Economia Política» — *prefacio* — C. Marx, aparecida en 1859).

Estas conclusiones *son fruto de 35 años de penosa y activísima labor previo un estudio amplio de todo lo que puede abarcar una inteligencia tan preclara, un genio jamás igualado (lo que demostraremos en el próximo número si las circuntancias no lo impiden), como el de* Carlos Marx. *Merece la pena, pues, de meditar cada frase en su relación con las que le preceden y le siguen, si se quieren ver insospechadas directrices y tener ideas clarísimas de la sociedad pretérita, presente y de la venidera inmediata.*

EKZEMPLA STATUTO POR LOKAJ GRUPOJ

Organizaj Normoj

Orientiĝo por la fondo de lokaj grupoj

Cele al informado de la tuta P.U.I.L.-anaro kaj kun la deziro akceli nian kreskantan movadon, faciligante la plenan disvolvon de nia organizo proletesperantista, la Ekzekutiva Komitato interkonsentis redakti projekton de regularo, kiu taŭgu kiel modelo por fondi la lokajn grupojn, kiuj estos la rokoj, sur kiuj ni konstruos neŝanceligeble nian potencan, fortegan Union.

Oni devas atenti, ke la lokaj grupoj, kune kun la Profesoraro kaj centraj organoj, estas la plej gravaj pecoj de la tuta aparato proletesperantista kaj ili devas esti en intima interrilato, por ke la propagandlaboro estu efika kaj atingu la rezultojn sopiratajn: *klerigi la vastegajn malsuperajn tabolojn proletajn kaj klopodi, ke ili uzu Esperanton por siaj klasaj celoj.*

Kiam ni estos sukcesintaj pri tio, ni povos kontente konstati, ke nia peno ne estis vana, ke ne estis revoj de utopiuloj, kiu dezidigis nin entrepreni ĉi imponan taskon, sed profunda kaj atenta studo pri la bezonoj proletesperantistaj nunaj kaj estontaj en la landoj, kie nia Unio etendiĝas.

Eble kelkaj k-doj, studintaj tro rapide nian Statuton, trovas, ke nia P.U.I.L estas iom komplika, sed al tiuj ni devas diri, ke ĝ estas tiom simpla, ke sufiĉas 7 aŭ 8 individuoj por funkciigi ĝin kaj samtempe ĝi estas tiom elastpova en sia disvolviĝo, ke ĝi ebligas la plej grandan nombron de individuoj aktive partoprenantaj en la laboroj de l' Unio.

Ni evitu, ke okazu kiel en aliaj organizoj, kie ekzistas nur 4 aŭ 5 «gvidantoj» kaj la ceteruloj estas «maso». Ni klopodu, ke en nia pretbatala Unio estu «maso» da «gvidantoj». Ĉiu estu *aktiva* en la laboro!!!

* * *

Ne signifas, ke estu tute deviga la prezentata projekto de Statuto por la lokaj grupoj, sed ĝi devas taŭgi, kiel orientiĝo kaj gvidilo por la k-doj, kiuj deziras fondi grupon laboristan en sia respektiva loko. Ili povas akcepti aŭ malakcepti, forstreki, aldoni, korekti, ktp. ktp., se ili kredas tion necesa laŭ la loko kaj cirkonstancoj.

Ni per tio volas nur akceli kaj faciligi iliajn laborojn, sed ni devas averti, ke estas nepre necese, ke ĉiu grupo, societo, ktp. ktp. kiu deziros aliĝi al P.U.I.L. devos plenumi en sia statuto jenajn kondiĉojn:

1-a Ke en ĝia nomo klare estu montrite ĝia laboristeco.

2-a Ke ĝi estu ekstertendenca inter la laboristaro.

3-a Ke ĉiu membro aktiva de la loka grupo, estu ankaŭ aktiva membro de P.U.I.L.

4-a Ke ĉiu membro, kiu ne estu ano aktiva de P.U.I.L., restu pasiva membro de la loka grupo.

5-a Ke ĝi estu klasbatala.

Ĉi tiuj kondiĉoj estas bezonataj por la bona funkciado de la diversaj organoj de P.U.I.L. kaj sen la plenumo de tiuj elementaj punktoj, neniu grupo povos eniri en la P.U.I.L. Por realigi tion, ĝi devas agi laŭ la artikolo 23-a de la Statuto de la Unio.

STATUTO

Grupo Laborista Esperantista (P.U.I.L.)

NOMO KAJ CELOJ

Art. 1-a — Sub la nomo «Grupo Laborista Esperantista», fondiĝas societo, kies celoj estas:

A) Konstante propagandi kaj utiligi la internacian helplingvon *Esperanto* kaj tiel disvastigi rimedon de facila interkompreniĝo, kiu klerigu kaj altigu la intelektan nivelon de la laboristaro, kreskigante senton de monda solidareco.

B) Taŭgi kiel peranto en la interrilatoj de la organizoj laboristaj de klasaj celoj, se ili estas diverslingvaj.

C) Kulturi la Sciencojn kaj Artojn plej konvenajn por la klerigo de siaj membroj.

D) Fondi Esperantan Bibliotekon, kie ĝiaj anoj povos konsulti la valorajn verkojn fundamentajn de Esperanto kaj aliaj Sciencoj aŭ Artoj.

E) Laŭeble, la instruado estas tute senpaga·

MEMBROJ

Art. 2-a — Povas esti membro ĉiu persono, kiu akceptante ĉi tiun statuton, ne opozu sin kontraŭ la emancipa movado de la laborista klaso. Li devos peti aliĝilon, kie estos notate: nomo, antaŭnomo, aĝo, profesio kaj adreso, ĝi estos subskribata de la membro proponanta kaj proponata. La aliĝilo estos fiksata dum 15 tagojn kaj se en tíu intertempo oni estus farinta ian plendon la Komitato studos kaj decidos pri ĝi.

Art. 3-a. — La membroj estos *aktivaj* aŭ *protektantaj*. Estos *aktivaj* membroj tiuj, kiuj scias skribi kaj paroli sufiĉe korekte Esperanton kaj apartenas kiel membroj *aktivaj* al P.U.I.L. Ili havos voĉdonrajton.

Art. 4-a — Por validigi la aktivecon de iu membro, la Komitato citos tagon kaj ekzamenos ties lingvoscion laŭ supre citita paragrafo.

Art. 5-a. — Estos *protektantaj* membroj, la simpatiantoj, kiuj ne scipovas Esperanton kaj tiuj, kiuj ne apartenas kiel membroj *aktivaj* al P.U.I.L. Ili havos parolon, sed ne voĉdonrajton.

Art. 6-a — La minumuma kotizo estos de *unu peseto* monate, sed oni povas plialtigi ĝin se la Ĝenerala Kunveno kredas tion necesa.

Art. 7-a — La financa disvolvo de la grupo konsistos el: kotizoj de la membroj, donacoj, profitoj de festoj tiucele organizitaj kaj la komunaj posedaĝoj.

ADMINISTRACIO

Art. 8-a — La administron kaj gvidon de la Grupo zorgos Komitato, kiu konsistos el: Prezidanto, Sekretario, Kasisto, Kalkulisto, Bibliotekisto, 1-a Voĉdonanto, 2-a Voĉdonanto kaj la Prezidanto de ĉiu Sekcio. La nombron de postenoj povos ampleksigi la Ĝenerala Kunveno. Por okupi postenojn devas esti elektataj aktivaj membroj.

Art. 9-a — Ĉiujare en la monato. Januaro estos elektataj la postenoj, ĉesante, en la una jaro, tiuj, kiuj havas paran nombron kaj en la sekvanta, kiuj havas neparan, kaj tiel sinsekve. Tamen la ĉesintoj povas esti reelektataj. Se dum la jaro iu posteno fariĝus vaka, povos esti anstataŭata de la Komitato.

Art. 10-a — La Komitato kunvenos ĉiumonate minimume kaj ĉiam, kiam ĝi opinius necese laŭ sia kriterio.

Art. 11-a — La reprezentanto de la Grupo estas la Komitato, kiu decidos pri la akcepto aŭ eksigo de la anoj, sed la grupano eksigata estos nur provizore, kiu rajtos sindefendi antaŭ la Ĝenerala Kunveno, kiu laste decidos.

Art. 12-a — La Komitato povos redakti internan regularon, kiu determinos la reĝimon privatan de la Grupo.

Art. 13-a — Ekzistos ĝenerala inventario, kiu klare montros, kion posedas la organizo.

Art. 14-a — Oni povas fondi, interne de la Grupo, tiom da komisionoj kaj sekcioj, kiom oni opinios konvenaj por la plenumo de la programo, kiu estu planita kaj la Prezidanto de ĉiu el ili reprezentos sian Komisionon aŭ Sekcion en la Komitato.

Art. 15-a — Se la Komitato trovus, ke iu Komisiono aŭ Sekcio malutilus aŭ kontraŭus la celon de la Grupo, povas senraitigi ĝin ĝis, kiam la proksima Ĝenerala kunveno decidos la konflikton.

Art. 16-a — La profesoroj membroj aktivaj de la Societo povos partopreni en la Komitato, kiel konsultaj komitatanoj dum ili havos tian postenon.

Art. 17-a — La taskoj kaj zorgoj de la Komitato estas:

Prezidanto

Estos la reprezentanto leĝa de la Grupo, prezidos ĉiujn kunvenojn, zorgos pri la diskutoj, ne permesante ofendajn vortojn malbonsonajn.

Ankaŭ zorgos pri libro-registro, kie li notos la aniĝojn kaj eksiĝojn de membroj, indikante ĝiajn respektivajn adresojn.

Atentos, ke ĉiuj aferoj societaj estu skrupule plenumitaj kaj ordonos en urĝaj okazoj, kion li opinias oportuna.

En la plej proksima kunsido li devos sciigi pri la decidoj alprenitaj.

Subskribos kune kun la Sekretario la korespondadon kaj dokumentaron.

Sekretario

Li estos tia en ĉiuj kunsidoj kaj redaktos ĝiajn respektivajn aktojn, kiujn li surskribos en la concernaj libroj: zorgos pri la korespon-

dado kaj dokumentaro, kiujn li kune kun la Prezidanto subskribos.

Kasisto

Li estos la sola respondeculo pri la mono de la organizo, kiun li prizorgos. Li povos disponi je la mono nur por societaj aferoj.

Zorgos pri kaslibro, kie li notos plej klare ĉiujn enspezojn kaj elspezojn kaj prezentos la kalkulojn ĉiam, kian la Prezidanto aŭ la Komitato opiniu konvene.

Kalkulisto

Li prizorgos libron similan al tiu de la Kasisto kaj klasifikos laŭfake la enspezojn kaj elspezojn de la Grupo.

Subskribos ĉiujn dokumentojn, pri kiu li estu respondeca.

Ankaŭ li havos inventarion pri ĉio, kion la organizo posedu.

Voĉdonantoj

Ili devos ĉeesti ĉiujn kunsidojn de la Komitato kaj okupi iu ajn postenon, kiu fariĝus vaka, se la Prezidanto indikus tion al ili.

Ĉiu aŭ ambaŭ, laŭ reciproka interkonsento, zorgos pri inventario koncernanta la librojn aŭ objektojn, kiujn oni vendu por membroj kaj lernantoj.

Ĝeneralaj Kunvenoj

Art. 18-a — La ordinara ĝenerala Kunveno estos regule konstituata, kiu ajn estu la nombro de anoj aktivaj partoprenantaj ĝin, se ĝi estas kunvokita kvin tagojn antaŭe kaj estis notita la tagordo. Ĉe la horo anoncita, oni konsideros la kunvenon kiel unafoje kunvokita kaj se ne estos la plimulto da membroj oni atendos duon-horon pli por konsideri ĝin kiel duafoje kunvokita, en kiu la decidoj estos validaj, kiu ajn estu la nombro da ĉeestantoj.

Art. 19-a — La ordinaraj ĝeneralaj Kunvenoj okazos en la monato Januaro de ĉiu jaro kun la celo aprobi la jaran Raporton kaj la kalkulan Staton, kiujn la Komitato prezentos, nomi la vakajn postenojn, se ili ekzistos, kaj renovigi la Komitaton, diskuti pri la tagordaj aferoj.

Estos elektataj du kalkulkontrolantoj por revizii la kalkulojn de la koncerna jaro.

Art. 20-a — La ĝenerala Kunveno estos eksterordinara, kiam kunvokos ĝin la Prezidanto pro decido de la Komitato aŭ laŭ peto de sesono da membroj aktivaj, kiuj ŝuldu nenium kotizon kaj ĝuu je ĉiuj rajtoj, se ili petis skribe tion, indikante, kio estos pritraktata kaj sub la respondeco de ilia subskribo.

Ĉi Kunvenoj estos kunvokataj en la sama monato de la peto kaj estos anoncataj ok tagojn antaŭe. En ili devos partopreni la absoluta plimulto da anoj aktivaj kaj se tiu nombro ne estus atinga ta, ĝi okazos post duonhoro de la fiksata tempo kaj, kiu ajn estu la nombro da ĉeestantoj, la decidoj estos validaj.

Art. 21-a — La modifo aŭ reformo de statutoj nur povos okazi en Kunveno ĝenerala tiucele kunvokita kaj samforme kiel la eksterordinaraj kaj oni devos prezenti pere de la Komitato la modifojn studitajn, kiuj estas alfiksitaj en la anonctabulo dum dek kvin tagoj.

LIKVIDO DE LA SOCIETO

Art. 22-a — La likvidon de la organizo oni interkonsentos en eksterordinara ĝenerala Kunveno tiucele kunvokita, sed ĝi ne povos esti likvidata dum ekzistu tri membroj aktivaj dezirantaj funkciigi ĝin. Interkonsentita la likvido la tuta posedaĵo de la societo estos transdonata al organizo «Prolet-esperantista Unio de Iber-amerikaj Landoj».

Provizora artikolo — Tiu-ĉi organizo estos en la sekvanta adreso: (Strato, numero kaj etaĵo).

(Loko kaj dato)

(Subskribo)

NIA UNUA KONKURSO por la instruantoj P. U. I. L.-anoj

Kelkaj k-doj plenaj je entusiasmo, sekve de nia alvoko en la n-ro 2 de «Proleta Voĉo», jam enskribiĝis al nia konkurso kaj ni atendas, ke ankoraŭ aliĝos sufiĉa nombro da laboremuloj. Ni sendube atingos gravajn fruktedonajn rezultojn de la sinsekva, metoda organizado de niaj konkursoj. K-doj, memoru la monkonatan alvokon de Karl Marks: «La emancipo de l' laboristoj devas esti farata de l' laboristoj mem». Tiel ankaŭ ni povas diri: «La fondo de proletesperantista movado devas esti farata de la proletesperantistoj mem» Ni ne atendu, ke la kadavre putra «neŭtrala» movado helpu nin, ĉu per silentado, ĉu per atakoj.

Temas pruvi, k-doj, ke ni ne bezonas tian aĉan helpon, duobligante niajn fortojn por varbi plej grandan nombron de membroj al P.U.I.L. Por faciligi vian laboradon, legu atente la Art. 17-an de la Statuto de la Profesoraro de la Unio.

Jen la sola vojo por la prospero kaj grandiĝo de l' Unio: la profesor-labor-konkurado.

Rekompencoj

La rekompencoj konsistos el tri subvencioj dividitataj jene: *25 ptoj.* por la instruanto varbinta pli grandan nombron da membroj, *15 ptoj.* por la instruanta sekvanta en dua loko, *10 ptoj.* por la instruanto klasifikita en tria loko.

Kondiĉoj de la konkurso

1-a Sendi al la Ĝenerala Sekretario almenaŭ 15 tagojn antaŭ la *komenco* de la kurso jenajn informojn: daton de la malfermo de la kurso, adreson de la ejo, kie oni faras la kurson, karaktero de la societo (se estas en societo) ĉu kooperativa, partia, sindikata, kultura, esperantista, arta, muzika, kun noto se ĝi estas laborista aŭ ne.

Ĉiu instruanto, kiu jam estu komencita kurson, devos sendi informojn klarigante la daton de la malfermo kaj ĉiujn detalojn suprecititajn.

2-a Dum la daŭro de la esperanta kurso, ĉiu instruanto klopodos varbi por P.U.I.L. siajn lernantojn, kies aliĝiloj, subskribitaj de la profesoro, estos sendataj al E. K. por kontroli la annombron, kiun ĉiu instruanto sukcesis atingi. Ne estos validaj la aliĝiloj, se ne estas akompanataj de la mono.

3-a Ĉi konkurso daŭros ĝis la 31-a de decembro de kuranta jaro kaj post tiu dato, la E. K. klasifikos la partoprenantajn instruistojn laŭ la kvanto de membroj, kiun ĉiu el ili varbis por P.U.I.L.

4-a La klasifiklisto de la instruantoj estos publikigata en nia organo.

Se estonte la partoprenantoj fariĝas Profesoroj de l' Unio, ilia varblaboro estos valida por akiri la avantaĝojn, kiujn la statuto de la Profesoraro klarigas en siaj artikoloj.

La Ekzekutiva Komitato

LIBRO-SERVO DE P. U. I. L.

La Ekzekutiva Komitato en sia lasta kunveno interkonsentis la organizadon de libroservo, kiu taŭgu por liveri ĉiujn valorajn verkojn en kaj por esperanto. Per tiu rimedo ni faciligos al niaj mendintoj la aĉeton de esperantaĵoj kaj samtempe P. U. I. L povos havi profiton, kiu estos destinita al la publikigo de eldonaĵoj de l' Unio.

Mendu viajn verkojn kaj propagandilojn al la libroservo de P.U.I.L. kaj tiel vi helpos la ekonomian bazon de nia organizo

Ĉu fiaskas nuna sociordo

Ofte oni aŭdas paroli pri fiasko de kapitalismo, ĉu estas tio certa? Laŭ mia opinio la kapitalismo okazigis sian propran fiaskon, pro sia egoismo. Mi provos montri kelkajn faktojn pri miaj argumentoj. La progresado de mekanika industrio komencis de antaŭ malmultaj jaroj, la internacia produktado estis preskaŭ normala, negrava senlaboreco ekzistis, tial la homaro, laŭ ŝajne, vivadis ĝenerale trankvila; post kelkaj jaroj, la internacia kapitalismo ebligis ankaŭ eŭropan militon, nun ni ankoraŭ memoras bone pri la malsato kaj mizeroj okazintaj en ĉiuj militintaj landoj, restis, preskaŭ ĉiuj, en mizera situacio, ili havis grandajn malfacilaĵojn por reguli ilian ekonomion nacian. Je la servo de kapitalistaro scienculoj ĉiulandaj eklaboris multege konstruante novajn maŝinproduktilojn. La internacia kapitalismo opiniis alveninta la okazon por riĉiĝi pere de produktmaŝinoj, ĉar kun malmultaj laboristoj povus akiri pli da produktaĵo, tial la kapitalismo komencis maldungadi laboristojn el siaj laborejoj, nun oni kalkulas, ke estas en la tuta mondo kelkmilionoj da laboristoj, kiuj jam delonge estas senlaboraj, tial la plimulto malsatas, sed la burĝaro daŭre maldungas laboristojn, kio okazos? La burĝaro ne rimarkis, ke ĉiuj laboristoj, kiuj restas senlaboraj ne enspezas nek elspezas monon, kaj pro tio okazas, ke ju pli da laboristoj estas senlaboro des malpli da laboro havas la burĝaro en siaj industrioj.

La kapitalismo eble opiniis, ke progresado de produktmaŝinoj estis favora nur al ĝi. «Sciencon kaj teknikon oni devas utiligi por faciligi la produktado al laboristoj», kaj ne por riĉigi burĝaron. Laŭ mia vidpunkto pro troa produktado oni devis organizi la laboron tiele: se antaŭe sen maŝinoj oni produktis aŭ konstruis, ekzemple 100, kaj poste, pere de maŝinoj 400, kompreneble oni devus labori pli malmultajn horojn ol antaŭe.

Ni bone jam scias, ke burĝaro neniam aranĝos la produktadon tiele, tio estos eble, nur kiam ni la laboristoj el la tuta mondo malaperigos burĝaron, tio estas, kiam estos nur unu «klaso», la laboristoj. Dume, povas daŭri la fiaskemo de kapitalismo kaj ni devas penadi malaperigi ĝin. Poste ni organizos nian propran socion.

Canet

Propagandu Esperanton per nia organo en ĉiaj laboristaj grupoj k societoj klasbatalaj

(Contiuuación)

del siglo de la revolución burguesa, en su última forma, la más consecuente y la más revolucionaria, a saber: el materialismo ateísta. El libre pensamiento se desarrolla en el seno del proletariado industrial. Así es como la religión y el librepensamiento se disputan en lo sucesivo el cerebro del obrero. El resultado de estas luchas es distinto según los países.

Niaj infanpioniroj

Al ĉiuj gekamaradoj,

ĉefe al la infanpioniroj:

Ni devas lerni Esperanton, por ke ni havu eblecon interkompreniĝi kun niaj ge-kdoj de la tuta mondo.

Mi sentas neceson, ke unue devas unuiĝi la infanoj de la Iber-Amerikaj landoj.

Sed ni, infanpioniroj, ne nur devas lerni, ankaŭ devas lernigi la Internacian Lingvon.

Se ni agas tiamaniere, ni kreskigos P.U.I.L. per niaj instruistoj.

Ĝis nun ni estis devigataj lerni anglan, francan, germanan, kaj aliajn lingvojn por interkompreniĝi kun la eksterlandaj infanoj, kion nur povis atingi la burĝulidoj, ĉar estis trokosta al niaj gepatroj.

Nun ne, do ni havas lingvon internacian kiun faciligas al ni la interkomprenon kun niaj gek-doj alilandaj kaj estas preskaŭ ne kosta.

Tiu lingvo estas Esperanto.

Al la infanpionira fako estas reservata la plej grava tasko en nia Unio. Ni estas la morgaŭaj gvidantoj de P.U.I.L.

Ni ne nur devas sekvi la komencitan laboron de la nunaj gvidantoj sed superi ĝin per nia forto.

Geinfanoj: por ke ni povu helpi la proletesperantan movadon en la Iber-Amerikaj landoj ni organziĝu en la infanpionira fako de PUIL,, kien ni trovos la bezonatan forton por unio de la infanpioniroj de la Iber-Amerikaj landoj kaj la tuta mondo.

Vivu la infanpionira fako de P.U.I.L.

Vivu P. U. I. L.!!!

A. Porta

GEKNABOJ!

Kolektive skribu per Esperanto aŭ per hispana lingvo al jena adreso: H. Bourguignon, ĝener. sekret. de Internacia kor-do., Saint Maximin la Ste. Baume (Var), Francio.

POR RIDI

« Un sargento de la reserva, en tiempo de paz, catedrático extraordinario de filología románica de Göttingen, tenía que acompañar a unos franceses prisioneros desde Maubeuge a Alemania. Oíase el retumbar del cañón. De pronto, ve el teniente del grupo que el profesor se ensarza en una disputa con un prisionero. El francés acciona fuertemente excitado. Tras los anteojos del catedrático se ven chispas de furor. Acude el teniente, teniendo pelotera y palos, y lanza un *¡Rayos y Truenos!* formidable. El profesor explica el caso y el teniente revienta, por poco, de risa. El francés, que sostiene las botas con bramantes, era catedrático de la «*Ecole des Hautes-Etudes*» de París. I la disputa versaba *Sobre la frecuencia del subjuntivo en los «Cantos de Amor» provenzales.* »

NIA MOVADO

MADRIDO

— La 14-an de novembro parolis germana k-do. en Laborista Esperantista Grupo, strato Andrés Borrego, 12 - 2-a, Otto Mankte pri «Vojaĝo de Proleto tra Eŭropo kaj avantaĝoj de Esperanto».

SABADELL

En la Laborista Kamparana «Blok» sabaton 25 de septembro je la 21-a vespere, k-do R. Arteu paroladis pri «Esperanto por la Laboristoj».

Li analizis la historion de Esperanto kaj klarigis kiel kaj kial oni atribuas al ĝi la internan ideon, ĉu ĝi evitis militon aŭ ne kaj fine li pruvis, ke laŭ klasa vidpunto ni ne povas forgesi la internacian helplingvon, Esperanto, ĉar ĝi estas rimedo je manoj de la laborista klaso por praktike, proletklase uzi ĝin.

La k-do R. Arteu estis entuziasme aplaŭdata eĉ estis kelkaj «neŭtraluloj» kiuj gratulis lin. Nun ni profitas ĉi okazon ankaŭ lin gratuli.

***

Okaze de la arbarfesto ĉe «Fontetas» (Sardañola), kie ĉeestis granda nombro da gekamaradoj, la kamaradinoj decidis sin organizi en Virina Praktika Fako por havi interrilatojn aŭ akcepti vizitojn de kamaradinoj samcelaj.

Ankaŭ ili estus pretaj partopreni kaj kunlabori en proletaj esperantaj festoj.

Por ĉiuj kamaradinoj, kiuj estu pretaj kunlabori, jen la adresoj: Angela Badell, strato Pedregar, 5, Sabadell; Providencia Auferil y Magdalena Porta, Per Polinyà, Sabadell; Manuela Vilar, str. Santa Tecla, 7 - ent., 2.ª (Gracia) Barcelona; Concepció Pla, Carme Batista, Maria Vilaró y Maria Cusó: Esperanta Unio, strato Clavé, San Cugat (Barcelona; Rosa Pera: Riego, 21, Sabadell; Teresa Carbó: Villaroel, 78, Barcelona.

Ni avertas ke ili akceptos interrilatojn nur kun virinoj samcelaj.

EL LA KONTRAŬA TENDARO

Ni laboru (?), sed manĝante...

Estas ignorate kiel, sed la certo estas, ke ni ricevis ian festan programon, kiu pretendas honori jubileon de neŭtrala organizo, nune en plena dekadenca burĝa ideologia putrado. Tio taŭgu kiel sperto por la naivaj k-doj, kiuj ankoraŭ kredas, ke estas eble fari ion bonan en la neŭtrala kampo.

Se la k-doj pionire fondintaj ĝin vidus en kion aliiĝis ilia penado, hontus, ke la farizeaj gvidantoj nunaj verku tiajn burĝecajn foliojn, anstataŭ serioze kaj metode labori por esperanto. Ilia laboro konsistas el tio: fari ian kurseton kaj konstante fanfaroni. Kiel pruvon, ni nur mencios, ke oni aranĝis bankedon, kiel kiu ajn vulgara societo burĝa. Kredeble, manĝante multe progresas Esperanto .. kaj dume mankas bonaj vortaroj por la instruado.

Dolorige estas, ke multaj laboristoj restas inertaj en tiaj societoj; ni invitas ilin aliĝi al ni kaj organizi grupojn opoziciajn por transformi tiujn organizojn verdulajn en laboristaj, forpelante senkompate ĉiujn parazitojn burĝecajn.

ESPERANTAJ KURSOJ

BARCELONO

— Sinsekvaj kaj ĉiutage en «Akademio Enciklopedia Esperanto» Str. Galileo, 40 - 2.º Barcelono.

— Ĉiu lunde, merkrede kaj vendrede funkcias en «A. E. P.» Str. Carmen, 30. Barcelono

— «Centro Obrero Aragonés» strato Baja de San Pedro, 55

— «B. O. C.» central: strato Palau, 1 kaj strato Jaume Giralt.

— «B. O. C.» (Clot) strato Xifré, 13.

MADRIDO

— Strato Ballesta, 4, 2-a (S. R.), ĉiu marde, jaŭde kaj sabate, de la 9 ĝis la 10 nokte.

— Strato Puebla, 11 (S. D. C.), ĉiu lunde, merkrede kaj vendrede, de la 9 ĝis la 10.

— Strato Andrés Borrego, 12 (P. C.), ĉiu marde, jaŭde kaj sabate, de la 8 ĝis la 9.

— Strato Ventura de la Vega, 14 (S. F.) ĉiu marde, jaŭde kaj sabate, de la 7 ĝis la 8.

— Strato Avenida, 27 (Biblioteca Cultural), Puente de Vallecas, ĉiu lunde, merkrede kaj vendrede, de la 8 ĝis la 9.

SABADELL

Ni devas organizi en ĉiuj urboj Federaciojn kun delegacioj en ĉiuj distriktoj.

Kiel ekzemplo taŭga por orienti sin la aliaj samcelaj k-doj, grupoj aŭ federacioj, ni publikigas la distribuadon, inter la aktivaj gek-doj el Sabadell, kiel esperantistaj instruantoj je diversaj distriktoj de la urbo, nome:

Centre Cultural Recreatiu, J. Viladoms; BOC, Criach; Terra i Mar, R. Arteu; Escuela Cultural, M. Marsell; Escuela industrial, J. Viladoms; Circol Republicà Federal, du kursoj, J. Castells kaj M. Altarriba; Círcol Republicà Creualta, Vicens Balagué; Cooperativa Sabadellensa, du kursoj, J. Porta kaj E. Vilella; Centre d'Estudis Psicològics, M. Martí; Cooperativa Barbarà, A. Burón; Esperanta Unio (San Cugat), R. Arteu.

Kamaradoj! Sekvu la ekzemplon de niaj spertaj k-doj el Sabadell.

Ankaŭ ĉiuj aktivaj membroj el Sabadell por sin informi estas devigataj partopreni, laŭ pove, en praktikaj esperantaj kunvenoj kaj viziti la federacian sidejon almenaŭ du foje monate, kie oni disdonas la prolet-esperantistajn gazetojn.

TERRASSA

— «Societat E. L. A.»: strato Wat, 40 ĉiu lunde kaj jaŭde.

— «Mutualidad Cultural Cooperatista» Baix Plaça, 12.

ZARAGOZO

—«Ateneo Obrero»: Pl. San Carlos, 3, 1.ª

Aliĝu kiel eble plej baldaŭ!...

ĉar comence de la venonta jaro ni ne plu disdonos la gazeton senpage al nemembroj de P. U. I. L.

NI RESPONDAS:

• K-do Artigas (Zaragoza). Ricevitaj via poŝtkarto kaj leteroj. Ankaŭ la poŝtmandato kun via aniĝilo. Ni dankas kaj invitas vin, ke vi instigu la aliajn k-dojn fari la samon por la fortigo de P. U. I. L.

• K-do Surrallés (Terrassa). Ni ricevis vian leteron kaj la monon por la enirkotizo. Ni atendas, ke vi multe laboros por nia komuna entrepreno.

• K-do Donato Martin (Fuentes de Nava, Palencia). Via letero kaj poŝtmandato kun la abono por la tuta proksima jaro estas ricevitaj. Lernu multe.

• K-do Jako Aragay (Castellar del Vallés) Viajn du leterojn ni ricevis. Ni notis ĉion, sed nepra kondiĉo por partopreni en la konkurso, estas aparteni al P. U. I. L. La aniĝon vi povas fari per poŝtmandato kaj se ne eblas al vi, faru poŝtmarke. Laboru multe por grandigi P. U. I. L.

• K-do M. Balaguer (Tárrega). Via letero estas ricevita. Ni notas vian deziron, sed avertas vin, ke nepra kondiĉo estas la aparteno al P. U. I. L.

• K-do F. d'O. G. (Lisbono, Portugalio) Ni ricevis vian leteron kaj artikolon, kiun ni publikigas kaj incitas vin perfektiĝi kaj labori por nia komuna afero. Daŭrigu la verkadon.

KORESPONDADO

SOVET-UNIO

— K-doj dez. kor. kun hispanaj gek-doj pri ĉ. t. Str. Voskresenks, Mos.-Kaz. ĵeldoraga. Novlanskoje NSTRK-9: K-do Fridental Karl.

Simpla anonceto trilinia kostas 0'50 ptoj. — Pli granda 0'25 ptoj. po linio. Anonco tre videbla kun kadro: 0 25 ptoj po kv. cm.

GAZETOJ RECIVITAJ:

— ANTIRELIGIULO. — N.º 2 ĝis la 8.ª Vere admirinda gazeta rezumo en esp-ta teksto de la organo ruslingva de UMA.

— SENNACIULO. — Organo de S. A. T.

— LA PROLETO. — Bulteno de Prolet-espt-istoj en Norvegio. N.º 8. Laŭdinda gazeto de niaj samcelanoj, aŭtografiita.

EL LA REDAKCIO

— Ni petas al k-doj, grupoj kaj societoj, kiuj malfermos kursojn dum la venonta jaro bonvolu sciigi al ni pri tagoj kaj loko, kie ili okazas.

Senprokraste sendu al ni vian varbilon kun la adreso tre legebla por faciliĝi nian laboron.



PROLET-ESPERANTISTA UNIO DE IBER-AMERIKAJ LANDOJ

VARBILO

Bonvolu enskribi kaj aboni al oficiala organo: K-do, K-dino

Familia nomo: ....

Antaŭnomo: ....

Profesio: .... Aĝo: ....

Strato kaj n-ro: ....

Loko: .... Provinco: ....

Lando: ....

Mi sendas per .... la sumon de ....

Samfamiliano de membro n-ro.: ....

Kiel: membro aktiva protektanta. (*)

.... 19 ....

(dato)

....

(subskribo)

(*) **Forstreku, kion vi ne deziros!**

TARIFOJ

Enirkotizo: 4 ptj. — Aliĝo al PUIL kun jarabono al «Proleta Voĉo»: 7'50 (Entute por la unua jaro 11'50). — Abonkotizo al «Proleta Voĉo» **por ne membroj:** jare 7'50 ptj. — Grupoj kaj organizoj: 4 + 7'50 = 11'50 ptj. jare. Samfamilianoj loĝantaj en sama loĝejo rajtas pagi nur unu jarkotizon. Ĉiu membro ricevas nian organon. La abonoj komencas en la unua tago de la jaro. Ankaŭ duonjaraj abonoj estas akceptataj.

Sendu la varbilon kun la mono al: Secretario de P. U. I. L., Strato Galileo, 40, 2-o
BARCELONO (SANS)

Presejo G. C. - Aribau, 153 - Barcelono